



PILO-PRESS

Internacia
Informservo

N-ro 49/77 - 27 dec 1977
Aperas ĉiusemajne

Jara abono

30,- GM

Abonu nun por
1978 !

Eldonanto/Herausgeber

Ludwig Pidel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (09 11) 46 36 49; 51 42 69

Pri Eŭropa Esperanto Unio

Bruselo (pp) - La prezidanto de Eŭropa Esperanto Unio (EEU), d-ro P. Dencel, dissendis sub la dato de la 1977-12-15 jenan cirkuleron:

"Pro diversaj kialoj - ne estas ĉi tie la loko por prijuĝi ilin - la "Eŭropa Esperanto-Centro", kreita en 1973 okaze de Eŭropa Kongreso en Luksemburgo, devis agadi en malfacilaj kondiĉoj. Ni devas tamen substreki la ampleksan kaj tre ofte sukcesan laboron farita tra la jaroj de s-ino J.H. Hoekstra-Sieders el Schoorl, administrantino de la Centro.

Okaze de la UK en Rejksjaviko, la kunveno por Eŭropo, en kiu ĉeestis reprezentantoj de landaj asocioj kaj fakuloj pri eŭropaj aferoj, decidis, laŭ propono de G. Leon-Smith, starigon de "Eŭropa Esperanto Unio". Tiu organizo agos kvazaŭ tegmenta asocio de la landaj asocioj, kies lando estas membro de la Eŭropa Komunumaro. Ĝin gvidos instanco kunmetita el la prezidantoj de tiuj landaj asocioj (laŭvice unu funkcios kiel prezidanto de la UNIO, la aliaj kiel vic-prezidantoj).

Laŭ impulso de UEA, en la kadro de ĝia regiona agado, estas restrukturita la "Eŭropa Esperanto-Centro", kun sidejo en Bruselo, kiu disponos pri propra oficejo kaj salajrita funkciulo. Tiu formaĵo, kiu iĝos (de la belga ŝtato) rekonata "asocio sen profita celo", nomiĝos:

Eŭropa Esperanto Centro, Sekretarito de Eŭropa Esperanto-Unio. Laŭleĝe ĝin devas gvidi unu konsilio kaj unu administrantaro.

La taskoj de tiu sekretariato estas: respondi al leteroj, distribui cirkulerojn, prizorgi kontaktojn kun la instancoj kaj organizaĵoj en Bruselo kaj funkciuloj de la Esperanto movado, informi la Esperanto gazeton, aranĝi kunsidojn, prizorgi ĝeneralajn sekretariajn laborojn ktp.

Financajn rimedojn por viviĝi la Centron antaŭvide liveros: kontribuoj de UEA, lokaj organizaĵoj, landaj asocioj kaj subvencio de oficialaj instancoj, Jam okazis preparkunveno. La oficiala fond-kunveno okazos plej eble baldaŭ.

En sia strebado por rekono de Esperanto en la sfero de Eŭropa Komunumaro la movado tiamaniere donas al si la instrumenton por sistema, kunordiga kaj, ni estas certaj, fruktodona laboro."

Informado en Oberkirch

Oberkirch (pp) - En Oberkirch (Nigra Arbaro, F R Germanio) kaj du najbaraj lokoj en aŭtuno prelegis pastro Hansjörg Kindler-Triksini el Luksemburgo pri Esperanto kaj faris libro-ekspozicion. Komence de decembro la Esperanto-grupo havis informstandon en la ĉefstrato de Oberkirch. La publiko estis atentigita pri ĝi per disaŭdigo de Esperanto-kanzonoj pere de magnetofono. Grupanoj disdonis flugfoliojn kaj varbilojn. Unu el la flugfolioj atentigis pri la lingvoproblemo en la Eŭropa Komunumo. Momente okazas en Oberkirch kurso por komencantoj. La grupo ankaŭ informis per gazetartikoloj.

F.W.P.

Noto: foto aperos en n-ro 5/77 (1/78) de Eŭropa Esperanto-Revuo.

Ne forgesu la Esperanto-Radiostaciojn! Ĉu vi jam skribis al ili laŭ la adreso de n-ro 48/77. Se ne, skribu tuj!

Pri la 63-a Universala Kongreso en Varna

Rotterdam/Varna (pp) - Aperis nun la Oficiala Komunikilo, n.ro 2 de la 1977.12.07. Laŭ ĝi la Unua Bulteno provizore estas elĉerpita. Oni planas represon de ĝi.

La Centro por Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (CED) organizos en la kadro de la 63-a UK Internacia Konferenco pri Esperantologio, kun la celo resumi per prelegoj kaj/aŭ seminario la nunan esplorstaton de esperantologio kaj montri la direkton de estonta esplorado. Personoj pretaj kontribui al la Konferenco kontaktu d-ron Detlev Blanke, estrarano de CED, ĉe Wollinerstr. 13/14, DDR-1058 Berlin, prefere antaŭ la fino de januaro.

Esperantaj verkistoj kaj verkemuloj atentigu, ke alproksimiĝas la limdato por la Belartaj Konkursoj. Por ĉiuj branĉoj krom fotografio konkursoj devas atingi la sekretariojn de la Belartaj Konkursoj ĝis la 31-a de marto. Adreso: Alec Venture, 7 Grosvenor Rd., Wallington, Surrey, SM6 0EG, Britujo.

Post dujara prokrasto, en Varna denove okazos Internacia Infana Kongreso por 6- ĝis 13-jaraj. Aliĝilo eldoniĝos en januaro 1978 ĉe la konstanta adreso de la UK.

La 46-a Kongreso de Blindaj Esperantistoj okazos samloke kaj parte samtempe kiel la Universala Kongreso.

Detala ekskursprogramo, kun prezoj, aperos en la Dua Bulteno. Inter la tuttagaj ekskursceloj estos la rumana urbo Mamajo kaj la antikva ĉemara bulgara urbo Nesebro.

Loka Kongresa Komitato sukcesis rezervi por la UK multajn litojn en Varna, por ke kongresanoj ne devu veturi ĉiutage de la hoteloj de la apudaj strandoj. Rezervilo por enurba hotelĉambro aperos kun la Dua Bulteno, kiel ankaŭ por loko en amasloĝejo, kiu situos same en Varna.

Internacia Esperanto-Klubo Aŭtomobilista organizos automobilan karavanan al Varna por la 63-a UK. Interesitoj kontaktu la ĝeneralan sekretariojn de IEKA, s-ron Jean Guillaume, 66 Village de Grasse, F-78810 Feucherolles, Francio.

Krome aranĝos karavanojn: Unuiĝo Franca por Esperanto, Esperanto-Centro Paderborn kaj s-ro Gustav Kühlmann, Danlando.

Internacia Seminario de GEJ

Rotenburg (pp) - Sub la temo "Edukado - kun kiuj celoj?" okazos de la 27-a de decembro 1977 ĝis la 3-a de januaro 1978 la 21-a Internacia Seminario de Germana Esperanto-Junularo.

La distriktestro de la distrikto Hersfeld-Rotenburg, s-ro Norbert Kern, skribis jenan salutvorton:

Kun speciala ĝojo mi bonvenigas la gvidantojn kaj partoprenantojn de la 21-a Internacia Seminario de Germana Esperanto-Junularo en la junulara klerigejo de nia distrikto, en la junulardomo de Rotenburg.

Estas mia deziro, ke vi bonfartu en nia domo kaj ke vi en via seminario kun la kadra temo "Edukado - kun kiuj celoj?" agos sukcese sence de la celo de Germana Esperanto-Junularo kaj ke vi per tio denove atentigas pri la internacia junulara laboro.

Sed trovu apud via laboro ankaŭ iomete da tempo por konatiĝi kun nia distrikto Hersfeld-Rotenburg, ĝia beleta mezmontara pejzaĝo, ĝiaj arbaroj kaj montoj kaj ĉarmaj urboj kaj komunumoj.

La numero 49/77 estas la lasta de la jaro 1977. Se vi deziras ankaŭ en 1978 regule ricevi la informilon, ni petas vin renovigi nun la jarabonon 1978!

Esperanto-gastejo malfermota

München (pp) - Sub la protektado de Bavara Esperanto-Ligo la Esperanto-Klubo München malfermos la 21-an de januaro 1978, sabate, je la 11-a horo la 1-an Esperanto-gastejon de Bavarujo.

La programo antaŭvidas:

- 11-a horo: Malkovro de la Ŝildo de la nove fondita Esperanto-gastejo
- 11,05-a horo: Paroladoj de reprezentantoj de Bavara Esperanto-Ligo, de Esperanto-Klubo München, de Germana Esperanto-Instituto (kiel gasto!)
- 11,20-a horo: Oni spilos barelon de senpaga biero!

Post la oficialaj aranĝoj okazos komuna manĝado kaj kunestado.

La Esperanto-Klubo München atendas multajn esperantistojn el la tuta lando. Sabato estas bona okazo vojaĝi al München kaj renkonti esperantistojn.

Jen la adreso de la gastejo kaj renkontejo: Gaststätte "Deutsches Eck", München, Schwanthalerstr. 58, tute proksime al la ĉefstacidomo!

La sarlanda ĝojo

Saarbrücken (pp) - Komence de 1978 aperos, kun subvencio de la sarlanda Kulturministerio, dulingva eldono de "La harmonio de la kontraŭdiroj. Eta sarlanda dialektologio" de Ludwig Harig, sarlanda aŭtoro loĝanta en Dudweiler. La tradukon plenumis lia samurbano, Reinhard Hauptenthal. La eldonkvanto estos limigita.

Ministeria agnosko

La sarlanda ministro por kulturo, klerigo kaj sporto ĵus asignis gravan monsumon al Sarlanda Esperanto-Ligo por subteni ties kulturenan laboron. Kiel sciante, SEL organizas regulajn Kulturajn Semajnfinojn en kiuj prelegas kaj gvidas kursojn internacie konataj esperantistoj. En 1978 prelegos Reto Rossetti (pri stilistiko) kaj Tazio Carlevaro (pri ido).

Esperanto en Radio

Letero de A. Chalm

Mi hontas! Oni plendas ke la oficialuloj ne okupiĝas pri Esperanto, kaj kelkaj el ni klopodegas por rekonigi la lingvon.

Tiun matenon mi aŭdis la rezulton de la ricevitaj leteroj ĉe Radio Varsovio dum la novembra monato: entute 321 korespondaĵoj.

Ni havas la ŝancon ke la pola ŝtato konsentis serioze pritrakti Esperanton dank' al la vigla agado de la Pola Esperanto Asocio! Kaj eĉ ni ne sukcesas valore subteni ilin per sendado de kelkaj poŝtkartoj. Radio Varsovio elsendas 1 horon kaj duonon proksimume ĉiutage, je la 6-a matene, je la 16-a kajduono posttagmeze kaj je la 22-a kaj duono vespere. Same kiel por la aliaj radio-elsendoj, ni perdos tiun oportunajon tiel gravan se ili ne sufiĉe ricevas korespondaĵojn.

Kaj oni ne respondu al mi, ke ili nur parolas pri politikaj temoj! Tio tute ne estas vera! Kompreneble okazas politikaj temoj, ĉar la pola ŝtato ne nur volas plezurigi la esperantistojn. Kiam oni scias kiom kostas elsendoj, oni bone komprenas la aferon.....

Persone mi regule korespondas kun ili, kaj sen paroli pri la reala intereso de la afero, mi opinias, ke tiu sendado de korespondaĵoj devus esti devo por la veraĵ esperantistoj!

Oni ĉiam plendas ke oni ne trovas okazon por praktiki la lingvon! Jen okazo tute bona por praktiki perfektan lingvon!

Havro, la 14-an de decembro 1977-a

Semajna komentario el Vieno

La 17-an kaj 18-an de decembro oni povis aŭdi el Vieno jenan semajnan komentariojn de d-ro Alfred Macher, kiun legis d-ro Karl Beckmann kaj Emil Vokal:

"La denova falo de la usona dolaro sentigas sin ĝis la plej malproksima mondangulo, sendormigas entreprenistojn, malesperigas eĉ multajn modeststatajn homojn.

Ĝi kaŭzas suferon ankaŭ en Aŭstrio. La oficistoj de la internaciaj organizoj en Vieno, ekzemple, ricevas por siaj en dolaroj pagataj salajroj malpli kaj malpli da aŭstriaĵ ŝilingoj.

Simile perdas la aŭstriaĵ soldatoj servantaj en Sirio kaj Cipro kaj pagataj, de UNO, en dolaroj!

Ni esperu, ke la dolaro draste relieviĝu antaŭ nelonge, por kompensi tiujn perdojn. Alie la malgrandaj ŝtatoj eĉ pagus mem por siaj kontribuoj al la paco en kelkaj mondpart-oj, dum la grandaj, superpotencaj profitas per armilaj negocoj, sabotas siajn proprajn konferencojn pri malarmado kaj repacigo.

Jam post nur unu semajno la kristanaro solenos sian kristnaskan feston. Baldaŭ, do, eksonos la voko "Pacon surtere al la homoj!" Sed ni pensas, ke homoj de aliaj religioj, nome la egiptoj kaj la izraelianoj esperas, en ĉi tiuj tagoj la pacon eĉ multe pli sopire."

Pri la aŭdebleco

Plej bone aŭdebla kaj komprenebla estas sendube momente la dimanĉa mezonda elsendo de Radio Vatikano. Ĝi estas ankaŭ ĉiam aktuala kaj interesa. Radio Romo kelkfoje ne estas aŭdebla, kelkfoje aŭskultebla, sed ĉiam malfacile komprenebla (sur 41 m). La Varsoviaj elsendoj nuntempe varias: La posttagmezaj kelkfoje estas supersonataj de rusaj elsendoj, kelkfoje bone aŭdebla. Ĝenataj estas ofte ankaŭ la vesperaj elsendoj, dum la matenaj elsendoj ĉiam bone estas aŭskulteblaj. La svisaj elsendoj sur 75 m suferas ofte je ĝenoj, sur 48 m la elsendoj ne estas aŭdeblaj. Ankaŭ la aŭstriaĵ elsendoj suferas je grandaj ĝenoj. Ĉiam bone aŭdeblaj estas la Zagrebaj kaj Pekinaj elsendoj.

Ni esperas, ke la plilongigantaj tagoj ankaŭ alportas denove pli bonan aŭskulteblecon.

Opinioj, reagoj

Dankon pro Pilo-Press 46, en kiu ni vidas mencion de nia Vatikana Radio.

Legante vian raporteton pri Varsovio, rilate la viziton de Sadat al Israelo, ni devas agnoski kiel ni estas malproksimaj de paca sento, kiam sama evento estigas entuziasmon ĉe kelkaj, indignon ĉe aliaj!

Tamen ni esperu ĉiam. Por la V.R. J. 11.XII.77/2396

Bona Espero al Radio Roma

El Bona Espero, Brazilo, s-ino Ursula Grattapaglia skribas: "Ĉiuvespere ni aŭskultas la programon de la itala Radio en la itala lingvo por Sud-Ameriko, sed kun bedaŭro, ke ĝi ne okazas en Esperanto, ĉar en nia komunumo laboras homoj el Aŭstralio, Azio, Eŭropo kaj Tut-ameriko, kaj do ni devas al ili traduki Esperanten el la itala. Ĉu ekzistas la ebleco, ke iam en la baldaŭa estonteco ni havos la feliĉon povi aŭskulti programojn en Esperanto direktitaj al Sudameriko?"

El Oberkirch, FRG, skribas s-ro F. Walter Poppeck: "De post multaj semajnoj mi sufiĉe bone povis aŭdi vian dissendon de 16.10.77. Estis kelkaj perturboj, sed ili estis relative malgravaj. Nur kiam vi legis la leterkeston, apuda stacio faris tiel fortan muzikan bruon, ke mi nenion komprenis. Je la fino denove vi estis bone komprenebla."